


Higinio García



Kapturnoj

FEL

Higinio García

Kapturnoj

Kapturnoj

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

n-ro 24 en la serio "Stafeto"



Tiu ĉi e-libro estas provlibro kaj rajtas esti disdonata kaj kopiata. La plena versio de la libro estas aĉetebla de Flandra Esperanto-Ligo, www.retbutiko.be

Neĝis ĉi-matene, frostas ĉi-nokte

1

Kvankam kaŭranta kaj iam dorskurba, la koloso devis esti almenaŭ kvincent metrojn alta. Ĝi sin kovris per renversita kaldrono, kiun Ĝi tenis per la ansoj kaj zorge premis sur la kapo. Ĝi nenion vidis per siaj senokulaj orbitoj, tra kiuj glitis la aerŝipoj de la Gravaj Personoj vojaĝantaj eksterurben; Ĝi nenion flaris per sia plata, mortokrania nazo, el kiu senpaŭze eliris nuboj de fumo; Ĝi elirigis nenan parolon el sia ege malfermita buŝo: nur fumojn. La enormaj mamoj, la ŝvela ventregoj, la lingamo, la testikoj inter kiuj malfermiĝis la ogiva jonio, la fleksitaj gamboj sur kies genuoj Ĝi apogis la kubutojn, la polpoformaj piedoj kies sennombraj tentakloj etendiĝis je kilometroj, ĉiam restis senmovaj.

... Nur ekstere. Ene, estis senĉesa movado de senĉesa produktado, ĉar la kolosa Uzino produktis ĉion. Ekzemple, ĝuste nun, el tiu dektrijara lernanto Dubĉeko Delponto, Ĝi estis fabrikanta instruiston de Volapuko.

Tial li piediris al la jonio, enirante la dudek-sep-etaĝan lingamon, kie troviĝas la Lernejo.

Malgraŭ ke li loĝis malproksime de l' lingamo, en unu el la tentakloj, li (kiel Konĉeta) preferis trapaŝi la Memorigan Parkon, kiu situis Ekstere inter la Gamboj, ol esti portata de la moviĝa trotuaro tra la longaj stratkoridoroj enaj. Estis la ĉasosezono, kaj li abomenis (kiel Konĉeta) tiujn sadismajn (kiel diris Konĉeta) kravatulojn kiuj paradis motorcikle kun la kapoj de siaj predoj pendigitaj al la gvidilo. Kun aŭ sen veturilo, uzinurbanoj estas maloftaj en la Memoriga Parko. Kiam ili ne havas aferon tie, ili prefere ĝin evitas.

Neĝis, kaj li rigardis la malrapidan kaj mistikan dancon de la flokoj deflugantaj de l' ĉielo. Iuj sin detenis sur la arboj; aliaj sur la statuoj de la tomboj; kelkaj lude trapasis la hologramojn de la mortintoj, kokete sin ŝminkante per ĝiaj koloroj.

Kiel Konĉeta, li amis la neĝon. Li amis ankaŭ volapukon, la fakon de Konĉeta.

Frostis ĉi-nokte, neĝas ĉi-matene...

La sama frazo, volapuke, havas ian poezian, misteran, bum-bam-an povon kiun ĝi ne havas Esperante: *Eflotos aneito, nifos agödelo...* Kvankam volapuko estas nun mortinta lingvo, Lia Doktora Moŝto la Direktoro de l' Lernejo ĝin faris truda studobjekto por enradikigi en la lernantoj la konkurencan kaj gajneman sintenon de tiuj komercistoj, kiuj dum la Historiaj Tempoj, kiam ĝi estis Internacia Komerca Lingvo, ĝangale kaj libermerkte voris inter si.

En Uzinurbo oni parolas Esperanton. Eble tial, la homoj ne amas la neĝon. Ŝajne, ankaŭ ne, l' Uzino, kiu sin tegmentas per sia kaldrono.

Dum li paŝis tra la Parko voje al la Lernejo, li sentis la freŝecon de la neĝo karesi lian vizaĝon. ...*Nifos agödelo*. Kaj li freneze kuris, transsaltante super la florbedoj, al la ogiva pordo de l' Uzino, plej frue aŭskulti, trinki, drinki tiun belan volapukon de la belaj lipoj de la bela Konĉeta.

Ĉar li amis la neĝon ĉar li amis volapukon ĉar li amis Konĉetan. *Löfob onsi, Läd Kontjeta!* Mi amas vin, sinjorino Konĉeta!

2

Dum la antigravita tubo suririgis lin ĝis la deka etaĝo, tiu de la dua klaso de la Meza Grado, li pensis pri Konĉeta kaj

forgesis Niksonon Peres. Tiu ĉi instruis la unuan periodon: Ekonomian Konsciigon kaj Adaptigon. Li sidiĝis, Niksono eniris kaj komencis la lecionon. Dubĉeko amis Konĉetan ĉar io ĉe ŝi ne estis adaptita, estis ribela al Uzinurba kunvivado. Iuj eĉ diris ke ŝi estas mut...

„Dubĉeko?” la marmeladeca voĉo de Peres vekis lin.

„Jen mi, Niksono.” Peres estis malpermesinta en sia klaso la uzadon de titoloj kaj familiaj nomoj, por pliproksimiĝi al siaj lernantoj.

„Ĉu vi vin sentas ema partoprenigi nin en kio vi scias pri l' Origino de Nia Uzino?”

Dubĉeko sciis ĉion, kaj sin sentis ema bori la stomakon de Peres eltirante el li bonajn notojn. Li do recitis papage:

„Laŭ la Manuskripto de la Akaŝikaj Arĥivoj konservata en la Neatingebla Koro de nia Uzino, Tiu ĉi estas ekonomia miraklo de l' Libera Merkato, kiu samtempe faligis Ĝin de l' ĉielo, kaj la Berlinan Muron teren. Superirante la ruinaĵojn de l' Muro, proletoj kaj mastroj de ĉiuj landoj unuiĝis, ŝaltis kaj produktigis l' Uzinon. Tiam finiĝis la Historiaj Tempoj kaj komenciĝis la Ekonomia Cikla Erao.”

Peres malbone ridetis. Li fajfis:

„Mi vidas ke vi ĉiam ĉion ĉias... ke vi sciam scion... Bone.” (Dubĉeko malvarme ĝuis, ĉar li preskaŭ aŭdis la gastrajn acidojn korodi la tubaron de Peres.) „Sed vi ŝajnas nenion kredi.”

Kiel kutime, Dubĉeko defiis lin:

„Mi legis alian teorion.”

„Ha? Kian teorion?”

„Laŭ la plej freŝdata ekzegezo ¹ de la Akaŝikaj Arĥivoj,” diris

Dubĉeko, verŝante sitelon de malvarma, fakta scienco en la dogmuman kapon de Peres, „l' Uzino estis desegnita kaj konstruita de l' arĥitekto kaj skulptisto Philippe Drouillet laŭ la konceptoj pri arĥiskulpturo kiujn li studis ĉe la Elohim-Gobanoj. Surterigoj de Elohim-Gobanoj elvenantaj de aliaj planedoj estas atestitaj de klasikuloj kiel von Däniken, Raël, Montagut, kaj de la dosieroj de la Belga Armeo en la Postmodernaj Historiaj Tempoj.”

„Jes, jes, mi scias. Karteziaĵoj de scienculoj ... Bone. Vian notkajeron?”

„Jen ĝi, Niksono.” Niksono enskribis „bonege” en lia notkajero, malgraŭ stomakbruligo. Li jam ne ĝenos lin dum la cetero de la leciono. Dubĉeko utiligis lian saksofonan melopeon kiel etosmuzikon, kaj pensis pri Konĉeta. Ĉu ŝi portos minijupon aŭ sarion? Aŭ tiun longan, larĝan jupon, kiu tiel valorigis ŝiajn gluteojn? Aŭ tiun streĉitan trikveston kies dekoltaĵo, kvankam avare, iom montris el la kapturniga dividlinio de la brusto?

3

„Sinjoro Delponto?”

Ne, ne estis la dolĉaĉa voĉo de Peres. Estis la velura, virina, varma melodio de Konĉeta.

Revadante, li ŝin ne vidis eniri la klasĉambron: ŝi aperis el nenio malantaŭ la instruista tablo, vestita per blanka peplo, kies kvazaŭmalseka teksaĵo divenigis ŝiajn nudaĵojn.

Ial, Konĉeta ne povis veni al la klaso. „Kial, Ĉiovida Buĝeto, kial?” Ŝi donos la lecionon holograme.

Dum Dubĉeko pensis, sinjorino Konĉeta trapasis la tablon kaj la pupitrojn kaj alproksimiĝis al li. Do, ne estas preregistrata

leciono. Estas dialoga hologramo. Eble ŝi anstataŭas alian aŭ aliajn instruistojn, kaj devas samtempe esti plurloke. Kial Konĉeta devas ĉiam anstataŭi ĉiujn? Bone, ŝi ne estas malsana. Ŝi estas en sia studejo.

SinJORINO Konĉeta, apude, ridetis al li:

„Söl Delponto? ²”

„Begob olsi sekusadön obi... ³”

La rideto de Konĉeta iĝis ankoraŭ pli ĉarma. El la lernantoj, Dubĉeko estis la sola al kiu Konĉeta parolis volapuke. Sed, por ke ĉiu komprenu:

„Ĉu vi povas deklinacii *dom*?”

„Jes, sinJORINO: *dom, doma* aŭ *de dom, dome* aŭ *al dom, domi*. Plurale ...”

Ja, la holograma Konĉeta vidis lin, parolis al li, alproksimiĝis al li. Sed ŝi ne bonodoris kaj ne delokis aeron sin movante. Kaj precipe, hodiaŭ li ne vidis la veran Konĉetan. Morgaŭ? Se tiuj damnaj instruistoj pri volapuko ne estus tiel tuŝrompeblaj ...

Finiĝis la leciono. La lernantoj eliris, sed la hologramo estis ankoraŭ malantaŭ la tablo kaj rigardis lin.

„SinJoro Delponto?”

„Jes, sinJORINO.”

„Ĉu vi bonvolus iri al la Dokumenta Centro, preni la *Vödabuk Lölik Volapüka* ⁴ kaj alporti al mi, en mian studejon?”

„Certe, sinJORINO. Ĉu libre aŭ mikrofilme?”

„Vi scias ke mi amas librojn.”

4

Li do vidis Konĉetan.

Elirinte el la Dokumenta Centro, li metis la kvinkilograman Kompletan Vortaron Volapukan sur sian kapon. Unue, li ĝin tenis per la manoj, kiel l' Uzino sian kaldronon. Sed post kelka tempo, li forigis la manojn el la libro kaj paŝis brakkruce, volvata de siaj pensoj. Ĉu estus la enhavo de la malnova libro kiu, kunvibrante kun li kaj Konĉeta, ekvilibrigis la mason? Eble. Kaj li metis la manojn en la pantalonpoŝojn, ĉar, post tempeto, la vortaro kaj li jam faris unuon.

... Li sufiĉe aĝas por esti inicata. Kial Konĉeta ankoraŭ ne proponis al li? Tamen, li rajtas. Li estas bona lernanto. Sed, ve!, neniuj lernanto estas inicita de Konĉeta. Konĉeta neniam kuŝis kun iu ajn lernanto. Ĉu ŝi vizitadas seksamuzejojn? Ĉu ŝi estas frigida? Li rapide kaptis la libron, kiu minacis fali teren.

Plurfoje, li volis demandi al ŝi: „Kial vi ne incas min?”

La libro sur lia kapo malpeziĝis, aeriĝis, memekvilibris. Sed io ĝenis lin. Prudente, Dubĉeko deprenis la Vortaron de sur la kapo, kaj portis ĝin subbrake. Oni diras ke Niksono eble kuŝas kun Konĉeta. Ba! Oni devus diri ke Niksono volas kuŝi kun Konĉeta. „Vidas okulo, sed mano ne trafas”. Do, la Vortaro surpris kapen.

Kun la volapuka vortaro surkape, li premis la sonorilon.

La pordo malfermiĝis, sed anstataŭ Konĉeta, li vidis Niksonon Peres.

„Malaperu!” knaris tiu ĉi, malĝentile.

„Eniru, Dubĉeko, eniru!” angore kriis Konĉeta malantaŭ Peres.

Dubĉeko ekpaŝis, kaj li vidis Konĉetan anhelanta, preskaŭ nuda, premanta per la dekstra mano la butonon kiu malfermigis la pordon, kaj per la maldekstra ŝian ŝiritan peplon, per kiu ŝi sensukcese provis kovri al si la bruston.

Tiom bela estis Konĉeta kovrata preskaŭ nur de sia pudoro, ke Dubĉeko, ne tute konscia pri la graveco de la situacio, enĉiele ridetis ŝin kontemplante. Sed nur dummomente. Ĉar la voĉo de Peres, strange malalta, eksaltigis lin:

„Malaperu!”

Dubĉeko ekkonsciis pri la danĝero. Nun, Peres frontis kontraŭ li, fikse rigardante lin rekte al la okuloj, la manojn kunigitaj antaŭ la brusto kvazaŭ li meditus, la femurojn horizontalaj, rektangulaj je la kruroj, laŭ la antaŭbatala teniĝo de la Tatakajaj Kavaliroj. Surda, mallaŭta rorado ekaŭdiĝis de ĉie, sed ĝin sonigis la elregita spiro de Peres.

Senmovigita de la hipnota tatakaja rigardo, Dubĉeko sciis ke Peres tuj saltos sur lin. Li jam plurfoje vidis tiun ĉi disciplini tro spritajn junulbandanojn: post la tatakaja frapo, li ne mortos: li plu vivos ... en komata senkonscio, kiel legomo.

... Kaj li ne plu parolos al Konĉeta.

Subite, la volapuka vortaro, helpata de la manoj de Dubĉeko, sin ĵetis sur la kapon de la Tatakaja Kavaliro, kiun ĝi terure frapis. Sed, danke al lia teniĝo, li ne falis: liaj horizontalaj femuroj vibris kiel risorto puŝanta la korpon supren kaj malen, ĝis, protektante la kapon per la manoj, li povis sufiĉe kontroli siajn gambojn por forfuĝi zigzage kaj ankoraŭ vibre.

Konĉeta, forgesante ke ŝi estas preskaŭ nuda, sin ĵetis al la kolo de Dubĉeko. Ĉu pro nervozo, ĉu pro la stranga irmaniero de Peres, ili ĝislarme ridis.

Tamen, post momento, ŝi malkuniĝis kaj, kovrante sian bruston per la brakoj, diris al Dubĉeko kun ĉarma rideto:

„Ni revidos nin.”

Dubĉeko foriris, fiero pri si.

„Dubĉeko?” li aŭdis malantaŭ si. Li sin turnis, kaj vidis la kapon - nur la kapon - de Konĉeta elirantan el la pordo.

„Dankon pro la vortaro,” kaj la kapo malaperis.

5

Ili sin revidis, kaj iris promeni tra la Parko. Neĝis, kaj Konĉeta ŝirmis sian kaj lian vizaĝojn de la incitetoj de la neĝeroj per sia ombrelo. Ĉar ĝi ne estis larĝa, ili paŝis alpremataj unu al la alia.

Nun, li sentis pri Konĉeta ion pli ol amon: li sentis...

„Fidon” diris al li Konĉeta, divenante lian penson.

„Fidon?” li skeptike ridetis. „Kiel je la Libera Merkato?”

„Ne, male. Ĉar vi scias ke mi ne utiligos vin.”

„Ĉu vi volas diri ke mi ne estas utila? Tamen, eĉ senlaboruloj utilas: por recikligi rubojn, por predi ratojn ...” li volis mirigi Konĉetan pro siaj konoj, sed li papagis, kaj Konĉeta malpacienĉis. Ŝi haltis kaj rigardis lin.

„Plirapidu kompreni,” kaj ŝi per rigardo, mirakle, komprenigis lin.

„Ĉu vi volas diri ke mi scias ke vi neniam perfidos min?”

Ŝi ridetis.

„Neniam.”

Silente, ili paŝis dum kelke da tempo.

„Sinjorino Konĉeta,” lia voĉo tremetis.

„Ĉu?”

„Sinjorino Konĉeta, pluraj kunulinoj jam proponis al mi min inici. Mi neniam volis, ĉar mi pensis ke vi... kvankam mi ne estas filo de kravatulo ...”

Konĉeta malĝoje ridetis.

„Amorante, mi vakcinus vin kontraŭ amo.”

„Sed mi surmetus kondomon, sinjorino...”

„Mi ripetas al vi: plirapidu kompreni.” Sed, ĉi-foje, nek li sukcesis kompreni, nek ŝi komprenigi. Ĉiu filo de kravatulo amoras unuafoje kun instruistino. La postan matenon, la instruistino akompanas lin ĉe liaj gepatroj, kaj elparolas la ritajn vortojn: „Vi donis al mi infanon, mi redonas al vi viron”. Kaj oni donacas pomon al la instruistino, kaj oni trinkas ĉampanon, kaj oni manĝas pejotlan ⁵ kukon. Certe, li ne estas kravatulido, sed li pensis ke ...

„Ĉu vi ne amas min, sinjorino Konĉeta?”

„Jes. Sed ĝuste ĉar mi amas vin, mi ne volas amori kun vi.”

Li plue ne komprenis. Ĉu ŝi estas frigida?

„Ne,” ŝi divenis, „mi ne estas frigida.” Kaj ŝi kisis lin... sur la okuloj.

Ŝi amikece metis la manon sur lian ŝultron.

„Ĉu vi vidas kiel via Uzino” - ŝi diris 'via' - „sin protektas per sia kaldrono? Tiel, vi uzinurbanoj” - 'vi'! - „vin protektas per viaj kundrinkadoj kontraŭ amikeco, per viaj kondomoj kontraŭ amo, per viaj re-kaj-reaj problemoj kontraŭ ...”

„Kontraŭ kio?”

Ŝi ridetis, faldis la ombrelon, levis la kapon al la ĉielo kaj etendis la manon, kiu kovriĝis per neĝo.

„Kontraŭ la neĝo de l' ĉielo, kiu riskas gliti en vian koron, kaj purigi ĝin.”

Ĉi-foje, Dubĉeko komprenis ke eble neniam li komprenos.

Ili promenis ankoraŭ plurfoje. Ankoraŭ traparke, ankoraŭ subneĝe.

6

„Lasu tiun... inon,” diris Niksono Peres, protekte metante la manon sur la ŝultron de Dubĉeko.

La tono, la gestoj de Peres estis pli proksimigaj, komprenemaj, gluaĉaj ol iam antaŭe.

„Kial?” li respondis, eltirante sian ŝultron.

„Ĉar mi ne volus detrui vin.”

Dubĉeko memfide ridetis.

„Ne kretenu, Dubĉeko. Se vi povis ...”

„... enkapigi al vi volapukon...” (enkapigi ion al iu estis preferata esprimo de Peres). Tiu ĉi ridis kaj frapis komplice la brakon de Dubĉeko, por montri ke li komprenas junulojn.

„Tio estis ĉar Konĉeta helpis vin.”

„Ĉu? Vi estis inter ni du.”

„Sed ŝi estas mutaciinto. Ŝi havas trian okulon kiun vi ne vi-

das. Ni, Tatakajaj Kavaliroj, scias ke mutaciantoj havas tiun trian okulon. Mi estis dummomente distrata de la povo de ŝia okulo.”

„Ba!”

„Rigardu min,”

Peres lokiĝis kontraŭ li, metis la manojn sur la ŝultrojn de Dubĉeko, kaj, per simpla premo de siaj mezfingroj, paralizis lin. Dubĉeko povis paroli:

„Lasu min!” sed ne moviĝi.

Peres lin lasis.

„Nun,” daŭrigis Peres, „lasu ŝin. Mi devas detrui ŝin. Kaj se vi estas kun ŝi, mi detruos ankaŭ vin.”

„Sed... sed kial?”

„Ĉar, mi jam diris al vi, ŝi havas trian okulon. Ŝi vidas, ŝi pensas, ŝi kredas aliajn aĵojn ol ni uzinurbanoj. Ŝi estas ateisto, kiel la aliaj mutaciantoj. Ili asertas ke ne estas Nevidebla Aŭkciisto, ke, Ekonomio ne estas scienco, ili do ne bruligas incensbastonetojn al l' Ekonomiaj Estaĵoj, kiuj protektas Uzinurbon, ili eĉ neas, ke ni ĉiuj vivas pro, en, kaj por nia Uzino ...”

„Sed nun ni estas en la lingamo de l' Uzino, ĉar ni estas en la Lernejo... do, ni vivas en l' Uzino ...” brillerninte rezonis Dubĉeko.

„Vi do vidas? Plue, kiam ŝi prononcas vorton, ĝi ne havas la saman signifon ol por ni. Ŝi diras ke ŝi amas vin (jes, viaj kunlernantoj klaĉas) ... ke ŝi amas vin, kaj ŝi ne volas inici vin.”

„Mi vere tion ne komprenas.”

„Ĉar vi nenion komprenas. Mutaciantoj diras ke ili estas

laboremaj, ne laboristoj. Fakte, ili estas kaŝitaj senlaboruloj, kiuj havas fantaziajn metiojn: poetoj, artistoj, instruistoj pri mortintaj lingvoj, ajn-istoj, ĉu mi scias... Ili estas komunistoj kiuj kuniĝas en la subteraĵoj de l' Memoriga Parko por manĝi karnon de l' mortintoj kaj trinki homan sangon. Dubĉeko: ŝi diras ke ŝi amas vin, ĉar ŝi volas manĝi vin."

„Sed mi, mi amas ŝin.”

Kaj li forkuris, antaŭ ol Peres konvinkos lin.

7

Konĉeta kaj Dubĉeko promenis sub la ombrelo.

„Sed ne estas vere, sinjorino Konĉeta. Tio ne povas esti vera, ke vi estas mutacianto kiu ne volas esti utila al l' Uzino kaj manĝas homan karnon kaj ne volas labori ...”

„Fi al vi kaj al via laboro kaj al via Uzino, Dubĉeko!” ŝi blasfemis. „Ĉu vi ne amas volapukon?”

„Jes, sinjorino Konĉeta, sed...”

„Kaj por kio aŭ al kiu utilas volapuko? Por skribi leterojn en mortinta lingvo al senvizaĝaj geuloj?”

„Sed, sinjorino Konĉeta, vi bone scias ke ĝi utilas por enradikigi en la lernantoj la gajnemajn kaj konkurencajn virtojn de l' Lib...” Dubĉeko reglitis en sian malvirton.

„Ne papagu. Mi ne estas Niksono Peres. Vi amas volapukon ĉar vi amas volapukon.”

„Ne, sinjorino Konĉeta. Mi amas volapukon ĉar mi amas vin.”

Ŝi haltis kaj strange rigardadis lin, kvazaŭ ŝi volus telepatii

ion. Sed li ne komprenis.

„Kial vi tiel rigardas al mi, sinjorino Konĉeta?” li diris, ektime.

„... Por pli bone manĝi vin, mia infano.” Dum li eksaltis, ŝi kaptis al li la kapon, kaj, ridante, ŝi longe kisis lin ... sur la frunto. Kaj poste: „Mi tiom volus scii ĉu via tria okulo malfermiĝos iam ...”

„Sed ne povas esti vere, ke vi havas trian nevideblan okulon kaj ke eĉ mi ...”

„Certe, ankaŭ vi, Dubĉeko, havas trian okulon kiu iam povos vidi nevideblaĵojn. Se l' Uzino ne krevigas ĝin ...”

Li rigardis la kolosan Uzinon, kun ĝia surkapa kaldrono. Eble, la koloso premis la kaldronon sur sia kapo por sin protekti kontraŭ la blasfemoj de Konĉeta. Ĉar tia parolado nepre altiros malŝancon kaj ekonomian recesion.

„Ne diru tion, sinjorino Konĉeta. Se iu aŭdus vin...”

Konĉeta ridetis, kaj premetis lian brakon. „Rigardu. Iu aŭdis min.”

Li sin turnis. Kiel vokita de la malbeno de l' kolosa Uzino, kiel Ĝi, falinte de l' ĉielo en sia negravita motorciklo, Niksono Peres estis apud ili. Li tenis en la mano laserglavon, ankoraŭ ne aktivigitan.

„Bonan vesperon, Niksono,” diris ĝentile Konĉeta. Kun sia kutima gesto, ŝi faldis la ombrelon kaj trankvile levis la kapon al la ĉielo, por senti la neĝflokojn sur la vizaĝo.

„Malbonan vi havos, femala monstro. Jes, mi aŭdis vin.”

„Kaj?”

„Kaj post kiam mi havos vian damnan virginecon mi tranĉos

al vi la kapon kaj ĝin reduktigos por fari al mi pendjuvelon.”

Dubĉeko, ĉi-foje senvortara, sentis sin sendefenda, kaj kaŝe ŝoviĝis malantaŭ Konĉeta.

„Ne timu,” ŝi diris. „Li nenion faros al vi ... nek al mi.”

Peres kruele ridetis kaj aktivigis sian laserglavon, kiu ronronis.

„Kaj kial ne, mi petas?”

Kvazaŭrisorte, la hokbeka tenilo de la ombrelo kroĉis la maleolon de Peres, kaj, preskaŭ samtempe, la pinto frapis la laserglavon, kiu desegnis ĉielarkon en la aero falante teren. Peres troviĝis kvarpiede, strabfikse rigardante la pinton de la ombrelo apogatan sur lia nazo.

„Unue,” afable respondis Konĉeta, „ĉar vi ne povas. Mi ne estas Tatakajo, sed vi vidas ke mi konas la militajn artojn de mia avino. Kaj due, ĉar mi foriros el Uzinurbo. Pardonu min,” ŝi aldonis kun sia plej ĉarma mieno, kaj ŝi endormigis Pereson per eleganta kaj lerta frapo de la ombrelo sur lian okcipiton. Li etendiĝis surtere.

Dubĉeko, skuata de subita doloro, sin lokis kontraŭ Konĉeta.

„Sed kial, kial, sinjorino Konĉeta, kial vi foriros? Ĉu vere vi ne plu instruos volapukon ĉe ni? Ĉu vi laboros aliloke?”

„Mi tutsimple ne plu volas labori por via aĉa Uzino. Mi volas nenion faradi, aŭ kanti, preĝi, fari aĵojn por nenio utilajn. Kiam via tria okulo malfermiĝos, se vi ne estos kreviginta ĝin, eble ni ankoraŭ renkontiĝos.”

„Sed, sinjorino Konĉeta ...”

„Mi devas iri,” ŝi diris ridante, „manĝi mortan karnon kaj trinki sangon de homo. Pensu ankaŭ pri mi ... krom pri mia brusto.”

Duafoje ŝi rigardis Dubĉekon per sia stranga rigardo, ankoraŭfoje kisis lin sur la frunto, turniĝis, kaj foriris.

Kaj Dubĉeko ne sekvis ŝin.

8

Kiel vekhorloĝo sonoris Peres:

„Jen Dubĉeko, nia romantika poeto. Promenante inter la tomboj, kiel kutime?” Li ŝajne forgesis (aŭ ŝajnis forgesi?) kio okazis. „Mi iras al la Lernejo. Ĉu vi volas kunrajdi?”

Jam noktiĝis, kaj malvarmo tremigis Dubĉekon. La neĝflokaj plu ne dancis en la aero: frosta vento mortigis ilin, kaj nun, ili kuŝis surtere. Anstataŭ ilia freŝa inciteto, li sentis survizaĝe la dolorigan pikadon de miloj da etaj glacipingloj kiuj svarme atakis lin.

Ne trovante la kuraĝon piediri hejmen, li jesis. El la lernejo, li revenos sur la moviĝa trotuaro, interne de l' Uzingambo.

Silente, la negravita motorciklo sekvis la lumkonuson de siaj reflektoroj, kaj sin direktis al la kolosa jonio, kiu pligrandiĝis proksimiĝante, kvazaŭ voronte ilin.

Nun Dubĉeko komprenas kion Konĉeta perokule diris al li: „Se vi amas min, venu do kun mi”. Kaj nun li komprenas ke li ne volis kompreni.

Ĉar li ne havas kaldronon, li do sin protektas kontraŭ siaj pensoj interplektante la fingrojn sur la kapo.

Notoj

[1.](#) Ekzegezo: klarigado de teksto.

[2.](#) S-ro Delponto.

[3.](#) Pardonu min ...

[4.](#) Kompleta Vortaro Volapuka.

[5.](#) Pejotlo: speco de kaktó (*Echinocactus Williamsii*).

Sub la fumoj de l' Uzino

1

Ĉi-foje, Nikko ne atingis la kapon de la rato per sia balailo. Li frapis la ventron, kaj la sango kaj la intestoj ŝprucis ĉiudirekten.

Kiam, malgraŭ la naŭzoj, li finis purigi, li eksplodis kontraŭ Leo:

„Sed kial, por farĉi kian ingon ni havas tiun kojonulon ĉi-tie? Dimanĉe mi ĵetos ĝin sin fingrumi en la rubejon!”

Tremante, Mudja ĉirkaŭprenis Leon al si. Kion farus tiu malgranda, pluŝa Leo en la rubejo, kun la ratoj, la blatoj, la sovaĝaj senlaboruloj kiuj certe manĝos ĝin? „Se vi estus kuraĝa kiel Nikko ...”

Leo, sekura en la brakoj de Mudja, cinike rigardis ŝin, poste Nikkon, kaj lekis al si la muzelon.

Vere, la kato nomiĝis Leonkoro, sed oni mallongigis ĝian nomon je Leo. Ĝi estis verdokula (kiel Mudja) kaj terure malkuraĝa. Fakte, ĝi neniam faris sian katan devon.

Nikko ĝin aĉetis kiam la Ekonomia Partio regis la Urbon. Tiutempe, por aktivigi la industriojn de motorcikloj, laserglavoj kaj kapredukto, oni forigis la kontrolojn pri ĉasado de senlaboruloj, kiuj estas la naturaj predantoj de ratoj. Konsekvence, kiel profetite de l' Ekologia Partio, la ratoj eniris en l' Urbon; kaj iom poste, en la domojn.

Kiam Leo vidis raton, ĝi eĉ ne ĝibigis la dorson kaj eĉ ne hirtigis la harojn. Kontraŭe, kompatinde miaŭanta, ĝi saltis en

la sinon de Mudja kaj kaŝis al si la kapon en ties akselo.

Nikko devis preni balailon kaj mortigi la invadanton.

De tiam, oni sciis ke estas rato ĉedome, kiam Leonkoro rifuĝis en la brakoj de Mudja.

Feliĉe, Nikko estis kuraĝa. Li persekutis la raton per balailo, ĝis fine li ĝin senmovigis en angulo kaj mortigis per bato sur la kapon.

Mudja admiris Nikkon, sed ŝi amis Leon. „Se Leo havus la kuraĝon de Nikko...”.

2

Krom tiu sekurenda kato, ŝi havis sekurigan, ĉifonan pupon kies nomo estis Birdotimo, mallonge Tim'. Ĝia vizaĝo estis ronda, kun malgrandaj okuloj kiuj ŝajnis la du punktoj de tremao surmetita sur malgranda fermita buŝo en formo de majuskla. Ĝi aspektis tiel stulta kaj sendefenda, ke Mudja inkliniĝis al mistrakto kaj turmentado. Tamen, kiam la pupo rigardis ŝin per siaj tremaaj, stultaj, tristaj okuloj, ŝi ĝin dorlotis.

Birdotimon faris la patrino de Mudja el malnovaj vestaĵoj de Nikko. Ĉar ŝi eltondis la trunkon el pantalono, ĝi havis zipon ĉe la ventro.

Por plenumi sian infanan devon, Mudja ludis kun la pupo. Ŝi ludis lernejon, hejmon, promenadon.

Hospitalon, ankaŭ. Ŝi tiris la zipon kaj operaciis sinjoron Birdotimon. Foje, la operacio sukcesis. Foje, la paciento mortis; Mudja enterigis en tirkesto kaj forgesis ĝin. Tiam, ŝi feris el Tim', ĉar fakte, ŝi ŝatis nek ludi kun pupoj, nek pupojn, nek Timon.

Ĉu estis ke Birdotimo tro similis al Nikko Calmavet, la fraŭla patro de Mudja? Ankaŭ li havis rondan, naivan vizaĝon, kun okuloj tro proksimaj inter si, kiuj aspektis strabaj. Sed kontraŭe, la rigardo, stulta ĉe la mola pupo ĉifona, estis ĉarma ĉe la grandkorpa, muskola, fortika viro. Kaj li plaĉis al virinoj.

Iam, unu el liaj amastinoj, pikkalkanumulino kiu plezuris ĉe pupoj, decidis havi bebon de li. Dum sia gravedo ŝi ludis pupojn: ŝi pretigis bebovestojn, lulilon, ludilojn, beboĉambron... Ŝi eĉ faris sekurigpupon por la venonta bebo, el vestaĵoj de Nikko: Birdotimon.

Sed la bebo kiu venis ne estis pupo: estis Mudja. Kaj ĝi ploris, kaj dumtage kaj dumnokte. Kaj ĝi senĉese malpurigis vindotukojn kaj hop-hop-antojn. Kaj ŝi rifuzadis dormi.

La sendefenda patrino provis ĉiom por silentigi la bebon: eĉ partigi siajn dozojn de mariĥuano kaj haŝiŝo inter siaj cigaredoj kaj ĝia suĉbotelo. Nenio efikis. Fine, ĉar laŭ la konsultata psikoterapeŭto, la bebo minacis endanĝerigi kaj ŝian pikkalkanuman karieron kaj ŝian virinecan liberon kaj ŝian mensan sanon, ŝi donacis ĝin al Nikko, kun Birdotimo kiel bonifiko ¹ kaj malaperis.

Tiu historio, kiun Nikko rakontis por klarigi al Mudja kial ŝi ne havas patrinon, faris ke la knabino sin demandis ĉu povas esti ke ŝi havas parapsikajn povojn. Ĉar oni diras en Uzinurbo ke bebo, kiu elsuĉas mariĥuanon aŭ haŝiŝon (kaj plie, mariĥuanon kaj haŝiŝon) aŭ psikozas aŭ parapsikas. Nu, ŝi ne psikozas, do ...

... Ĉu okazas tio kion oni forte deziras? Precipe, se oni havas parapsikajn povojn ...

Ĉu estas eble ke Leonkoro iĝos tiel kuraĝa kiel Nikko?

Ŝi sidis sur la kalkanoj, koncentriĝis kaj forte deziris por Leonkoro la kuraĝon de Nikko.

3

L' Uzino ĉiam fumis. La fumoj estis densaj kaj verdaj, starigis la horoskopistoj, por protekti la Urbanojn kontraŭ senlaboreco kaj ilin ŝirmi de la danĝeraj ultraviolaj sunradioj. Sed la nuancoj de verdo kaj la gradoj de denseco senĉese ŝanĝiĝis laŭ la humoroj de l' Uzino, kaŭzante tiun kalejdoskopan lumecon de l' Urbo kiun Mudja tiom amis. Ŝi neniam eniris en l' Uzinon. Sed Nikko diris ke Ĝi estis tiel supermezure granda, ke eĉ ne la inĝenieroj, kaj eĉ ne la Ekonomikistoj konis la tuton. Ĝi havis milionojn da okuloj de ĉiuj koloroj: blankaj, verdaj, flavaj, bluaj ... miloj da brakoj kaj buŝoj, duilionoj da nervoj ...

La parto kiun li parte konis, iel dirite ero de la intestoj, estis giganta labirinto de kaŭĉukmetalaj tubaj koridoroj tra kiuj kuris la recikligotaj restaĵoj. Tie, Nikko estis surkankra purigisto.

Rajdante biomeĥanikan kankron, li devis liberigi l' Uzinajn intestojn de la plastaj filamentaj mukaĵoj kiuj kreskis sur la parietoj.

Estis danĝera laboro. La mukaĵoj sin defendis per fulmrapidaj vipbatoj. Lerte stirata, la kankro per siaj pinĉiloj kaptis, fortiris kaj manĝis ilin. Sed, se la neŭromeĥanismo ² de la kankro aŭ la atento de la homo iomete mankus, la vipoj tranĉus hommembron kiel laserglavo.

Jes ja. Tio estis kiam Nikko alportis al ŝi korbeton kun kudrilaro. Enestis koloraj ŝtofpecoj, fadenoj, kudriloj, pingloj, kaj tondilo kiu tondis ŝtofon kaj paperon, sed ne la fingrojn.

Ŝi decidis - eĉ nun ŝi ne scias kial - fari veston por Tim'. Ŝi mezuris, tajlis, tondis, kudris... kaj fine fasonis la veston. Tamen, Tim' ne volis ĝin surmeti.

Ŝi jam certe konis la ribeleman karakteron de Tim'. Sed ĉi-foje, li eĉ ne volis esti vestata. Kiam brako eniris manikon,

gambo eniris la kolon de la vesto. Kiam la kapo trairis la kolon, la gambo sin enŝovis en manikon.

Mudja ekkoleris, kaj la fumo de l' Uzino iom malheliĝis.

Ŝi provis sin kvietigi, kaj pli milde, malpli rapide vesti Timon.

Senrezulte.

Nun, ŝi vere koleriĝis. Dum l' Uzino kraĉis preskaŭ nigrajn densajn fumojn, ŝi, furiozospasme, forŝiris al Tim' la gambon kiun li ne volis traŝovi en la krurumon.

Ŝi rigardis Timon, kiu komplice rigardis ŝin: ili ludos hospitalon.

L' Uzinaj fumoj, malsane nigraj, glue densaj, suĉadis la fenestrojn.

4

Oni abrupte malfermis la pordon de la domo. Eniris blovo de nigra fumo, kaj en ĝi du homoj portantaj brankardon, sur kiu kuŝis Nikko.

Mankis al li la dekstra gambo.

La homoj provis ekspliki al la knabino ke la neŭromehanismo de la kankro ne sufiĉe rapide reagis, ke ...

Mudja ne aŭskultis ilin: ŝi jam sciis ke l' Uzino detranĉis la gambon.

Ŝi sidiĝis sur la kalkanoj, kaj medite rigardis sian patron. Larmoj fluis el ŝiaj okuloj.

Ĉu pro kulposento? Ĉu pro fumo?

Ĉu pro fumo? Mistere, la fumoj kvietiĝis, heliĝis, kaj ŝvebis en preskaŭ blankaj kumuluso.

Ŝi spiris ilin.

Grade, la spiro ritmiĝis, ŝiaj grandaj verdaj okuloj sekiĝis, senrigardiĝis, kaj ŝi sentis ke ŝia konscio solviĝis en la Spirado de l' Uzino.

Tiam, sekure rifuĝinta en ia nodo de energio koncentrita en la umbiliko, ŝia profunda Mi serene intuciis ke ĉio estas en ĉio, ke ĉio por io utilas, ke ĉio estas bona.

La gambon de Nikko oni miksos kun aliaj hospitalo- kaj buĉejo-forĵetaĵoj, el kiuj oni faros kaĉon por katoj. Kiam oni miksos tiun etan kvanton de kuraĝula karno kun granda kvanto de alispeca, eĉ en proporcio de unu al miliono, la fina miksaĵo gardos en sia memoro, elektronike, la kuraĝon de kuraĝulo. La neŭronoj de malkuraĝa kato kiu manĝos tiun kaĉon estos do kuraĝigitaj homeopatie.

La gambon oni recikligos, Leo iĝos brava, Nikko havos belan metalan gambon kaj ne plu estos trudata mortigi ratojn per balailo.

Tra la helaj kumuluso de kvazaŭ incensa fumo, la malhelaj verdaj okuloj de Mudja kaj Leo rigardis Nikkon, kiu dormis en limbo de anestezo.

Mudja anĝele ridetis. Leo lekis al si la muzelon.

Notoj

- [1.](#) Bonifiko: ekstra profito atribuita ekster la kondiĉoj de kontrakto.
- [2.](#) Neŭro-: el la greka, prefikso signifanta „nervo-“.

Nekomputita

1

La dekan, nokte. Finfine, post la vesperaj lecionoj, mi eliras el la lernejo.

Ventas. Ankoraŭ la norda vento, kiu sin ŝovas tra la manikoj kaj la kolumo de palto kaj glaciigas la brakojn kaj la dorson.

Eĉ se mi estas tre laca, mi rapide paŝas hejmen.

Min atendas Klara, mia edzino, kaj Sonjo, mia trijara filineto.

Kiam mi alvenos, Sonjo ĉirkaŭbrakos min, demandos ĉu miaj lernantoj bone kondukis, senĉese babilos por prokrasti la enlitigon.

Poste, mi amoros Klaran. Mi estas malgrava ulo, mi scias. Sed mi estas fortuna. Mia edzino estas bela, tre bela, kaj ŝi amas min.

Morgaŭ estos dimanĉo. Ĉi-nokte ni amoros longatempe.

Mi mispaŝis, preskaŭ falis. Mi sentas malvarmon. La hejmo estas ankoraŭ malproksima.

Ĉar mi estas tute negrava ulo, mi devas iri piede. Ja, mi ŝatus havi rikiŝon (mi eĉ ne pensas pri aŭtomobilo). Post la lecionoj, oni min rapide veturigus hejmen. Kaj mi ne malvarmus dumvoje ... Sed mi fantazias. Neniam mia salajro tion permesos.

Verdire, mi laboras danke al la bonkoreco de Lia Doktoro Moŝto Sinjoro la Direktoro de l' Lernejo.

... Kiu ne laboras rajtas nek spiri nek vivi. Pripensu! Spiri! Konsumi oksigenon, elspezi aeron, tiel raran en niaj Uzinurboj, la aeron, principo de la vivo kaj, eĉ pli, de la Industrio! *La aeron kiun oni konsumas, oni devas pagi per sia laboro. Kiu ne laboras, ne spiru.* Tion diras Lia Doktora Moŝto. Kaj li pravas. Sed mi ne rajtas labori. Do, mi rajtas nek spiri, nek vivi. Se tamen mi laboras, mi spiras, mi vivas, tio estas danke al la bonkoreco, la kompatemo kaj la karitato de Lia Doktora Moŝto. Rajtu li konsumi tutan jaran Kompanioproduktadon!

2

Alta Uzinestro! Kiel mia domo estas for! Nun, mi devas eliri el la Uizinurbomuregoj kaj trapaŝi inter la Granda Rubejo kaj la kavernoj de la senlaboruloj.

Ĉi-tie ne estas stratlampoj, nek eĉ lumigata fenestro. Ĉio estas malluma. Oni povus maĉi la mallumon.

La senlaboruloj, ĉi-hore, jam finis la serĉadon de nutrorestaĵoj en la ruboj, kaj tro malvarmas por ĉasi ratojn kaj hundojn.

* * *

La vento moke fajfas pri mi, kaj glaciigas miajn ostojn por sin amuzi, kruela kiel miaj lernantoj.

Ho Uzino Nia! Kiel mi ŝatus havi aŭtomobilon, aŭ almenaŭ rikiŝon! Sed estas sence tian pensi. Mi estas tiel negrava ...!

Tamen, ĉiuj kvararangaj kaj eĉ kvinarangaj instruistoj havas aŭtomobilon, aŭ almenaŭ rikiŝon. Eĉ Ŝmit; la Paperujo-Portisto de la ĉefa Helpisto de la Profesoro pri Matematiko havas rikiŝon, kiun li trenigas al sia nesindikata konkubino. Sed Ŝmit estas klasifikita, kiel ĉiu normala homo. Li havas Majstreco-Diplomon pri Paperujo-Portado kaj Tabulo-Forviŝado.

Mi havas nenian diplomon. Mi neniam estis klasifikata. Oficiale, administracie, industrie, reale, mi ne ekzistas. Ja, oni povas diri ke mi estas leĝa fikcio de Lia Doktora Moŝto. Li pagas al mi kvazaŭ mi ekzistus kaj estus reala instruisto. Nia Sankta Ekonomio gardu lin eterne sub sia Protektado! Li plaĉu al Nia Altega Administracio! Amen.

Tamen ...

Tamen, se mi estus bonkonduktinta dum mia infanaĝo, ankaŭ mi estus povinta havi Diplomon, esti socie laŭorda, klasifikita, en arĥivoj kaj sliparoj enskribita, statistike kompilebla, enkomputinda ...: ekzistanta.

Al mi estus permesite konkursi por posteno de Kvinaranga Pedagogo. Poste, pro servodaŭro kaj subiĝemo al la ĉefoj, mi estus suprenirinta al Kvara-, Triaranga posteno ..., eĉ, kial ne? se mi estus tiomdaŭre vivanta, al Unuaranga aŭ eĉ Ĉefa Pedagogo, kiel Lia Moŝto ...

Hodiaŭ, tio ĉio estas nur forpasinta revo. Sed antaŭ dek jaroj mi ankoraŭ luktadis ...

Por povi konkursi al Pedagoga Posteno, oni bezonas Ateston Pri Kapablo Sin Adapti al Aktuala Kunvivado- kaj Progreso-Kunteksto. Mi petis ĝin al la Universitato, sed oni respondis al mi ke mi aldonu al mia Atestopetopresaĵo Atestojn pri 1) Morala, 2) Ekonomia kaj 3) Politika Bona Konduto.

Mi havigis al mi la Ateston pri Ekonomia Bona Konduto ĉe la Uzina Kredito-Sekcio kaj tiun pri la Politika ĉe la Polico. Sed, kiam mi iris al la Uzina Horoskopio-Oficejo por serĉigi la Ateston pri mia infanaĝa moralo, oni sendis min al Unuagrada Lernejo, kie oni devos atesti ĝin.

Mi preslitere skribis la Atestopresaĵon. Mi ĝin adresis al la Lernejestro, pere de la Sekretario, kaj al la Sekretario pere de la Paperoŝrankisto. Mi atendis respondon.

Respondo alvenis post unu monato: la Sekretario de la

Unuagrada Lernejo bedaŭris sciigi al mi ke Lia Memdonema Moŝto la Lernejestro ne povis subskribi Ateston pri mia Infanaĝa Bona Konduto.

Oni aldonis al la respondo Kopion de dokumento enestanta en mia dosiero. Mi ĝin scias parkere:

Delponto, Dubĉeko. DELD391219, 3a klaso. La 44 11 06, je aŭ ĉirkaŭ la dua, tiu lernanto petis al mi permeson por iri al la *pisejo* (laŭ sia dirmaniero). Evidente, mi punis lin laŭ la artikolo 4.03 de la Kodo de Lerneja Etiko, kie oni malpermesas korpajn bezonojn dum la leciona tempo, kaj laŭ la artikolo 4.05, kie oni malpermesas maldecajn dirojn.

Je aŭ ĉirkaŭ la kvara, la supre nomita lernanto, evidente malbonvole, ribele kaj malĉaste, malpurigis sian pantalonon, okazigante ridaĉojn kaj sendisciplinon ĉe siaj kunuloj.

Pri tio mi respekte informas Vian Memdoneman Moŝton, Sinjoro Lernejestro, por ke vi agu laŭ via saĝeco.

La 3a-klasa instruisto,
Peres Niksono PERN090918.

Kia honto, ĉiopova Financo, kia honto?

Do, mi povis havigi al mi nek la Ateston pri Infanaĝa Bona Konduto, nek tiun pri Morala, nek tiun pri Kapablo Sin Adapti al Aktuala Kunvivado- kaj Progreso-Kunteksto, nek, konsekvence, konkursi al posteno de Kvinaranga Pedagogo.

Se Lia Doktora Moŝto ne estus nominta min Anstataŭanta Subinstruisto mi estus nun sovaĝa senlaborulo, manĝanta malpuraĵojn el la rubejo kaj ĉasanta ratojn kaj hundojn. Sed danke al li, oni pagis al mi salajron kaj mi povis edziĝi kun Klara.

3

Mi paŝas, mi daŭre, kvazaŭeterne paŝas ...

Mi estas laca, ege laca, kaj mi sentas malvarmon.

Miaj lernantoj scias ke mi ne havas Diplomon kaj mokas min.

Sinjoro la Direktoro rakontis iam, por „malstreĉi la klasan atmosferon” mian infanaĝan aventuron, kaj de tiam ridtitolas min "Lia Pisa Moŝto".

Mi scias ke Sinjoro la Direktoro ne malbone intencis, mi ne volas lin kulpigi, sed ... miaj lernantoj estas tiel kruelaj por mi!

Mi ne plendas, ĉar, objektive, miaj lernantoj pravas. Tion diris al mi Lia Doktora Moŝto, kiam ununurfoje mi plendis al li pri la afero: „La unua devo de ĉiu edukisto estas atesti la Veron, kaj vidigi ke li akceptas kaj rekonas ĝin, eĉ se ĝi estas malagraba.” Ne, mi ne plu plendas, sed mi estas laca, laca ĝis sencerbiĝo kaj senkoriĝo.

Mi estas instruisto jam de dek jaroj: jam de dek jaroj mi suferas de la ĉiama mokitolo, kaj de la ĉiamaj ridaĉoj, kaj de la ĉiamaj kruelajoj.

Sed mi ne estas malfeliĉa. Ne. Klara kaj Sonjo atendas min kaj, kiam mi alvenos hejmen, mi ĉion forgesos. Mi povas diri ke mi estas feliĉa, kvankam mi ne havas eĉ rikiŝon.

* * *

Ankoraŭ tiuj vojetoj, inter la Granda Rubejo kaj la kavernoj de la senlaboruloj; ankoraŭ tiu mallumo. Mi irigas min instinkte, ĉar mi konas ĉiun ŝtonon, ĉiun gluan flakon ĉe tiuj vojetoj forpuŝaj, naŭzaj, nehomaj. Trans iuj kavernotruoj, mi divenas la ruĝajn simiajn okulojn de la senlaboruloj, kiuj envie

kaj malame min rigardas. Mi timus, se mi ne sciis kiom la senlaboruloj estas senkuraĝaj kaj senvolemaj. Ili neniam atakas la homon, ĉar tio trovigus pretekston al la Sindikato por plia pogromo.

Mi sentas ilian envion kaj malamon pasi tra haŭtporoj. Ili envias mian socirangan sekurigan sandviĉecon: superuloj superstaras min kaj min substaras subuloj. Ili envias mian „rajton” labori kaj ĝismorte laciĝi; mian „rajton” strebadi por nesufiĉa salajro; kaj kion alian ...?

Sed verŝajne ili pravas. Malgraŭ ĉio mi estas feliĉa, ĉar mi amas Klaran kaj Klara amas min, kvankam ni ne havas aŭtomobilon, nek eĉ rikiŝon.

Ĉiuj tiuj problemoj haltas antaŭ la pordo de mia domo. Poŝtone, po-brike, po-branĉe ni estas konstruintaj tiun domon, nian amo-neston, kiu estas por ni sorĉita kastelo kies malfermigan sorĉoformulon nur ni konas. Neniu kaj nenio povas trapasi ĝian sojlon, gardatan de amtalismo: nek malvarmo, nek malamo, nek envio, nek malestimo. Hejme varmas kaj amas.

Ververe, objektive, maldecas ke neklasifikita, eĉ ne oficiale ekzistanta ulo estas feliĉa. Se la Direktoro, la aliaj instruistoj aŭ la lernantoj tion sciis, ili neniigus min. Min, Klaran kaj Sonjon. Sed ili pravus. Ili obeus sian devon. Korfunde, mia konscienco riproĉas min. Ĉar mi scias ke mi ne havas la rajton esti feliĉa. Mi foje eĉ aŭdis diri ke la familia vivo de Lia Doktora Moŝto estas vera infero. Li kaj lia edzino, laŭdire, senĉese kverelas. Lia Doktora Moŝto Sinjoro la Direktoro de la Lernejo, kies oficejo estas tapetita per Diplomoj, Titolatestoj, Honoraj Mencioj ...! Ne estas Ministrejo, Oficejo, Kabineto kie ne estas ia nomo kaj titoloj de Lia Moŝto; kun kiuj li ne korespondas cirkulere, letere, telegrame kaj eĉ komputile. Kiuj honorindas skribi al li, devas adresi al „Lia Doktora Moŝto Sinjoro la Direktoro de la Uzinurba Altlernejo, Ĉefa Pedagogo”, kaj tiel plu, kaj tiel plu. Se oni forgesas eĉ unu adresvorton, la afero ne estas konsiderata. Tia homo estas malfeliĉa, kaj mi, hontinda

pario, estas feliĉa! Ĉioscia Buĝeto! Se li sciis ... Mi ne kuraĝas eĉ imagi. Mi certe agas saĝe kaŝante mian familion.

* * *

Mi jam postlasis la Rubejon, mi trapasas la Urbopordegon. Trans la strato, mi vidas mian domon.

Sed... sed mi maltrankviliĝas. Mi ne vidas lumon trans la fenestroj. Tamen, almenaŭ la lampo de la saloneto ĉiam lumas, eĉ se Klara kaj Sonjo enlitiĝis ...

Mi timas. Kio okazis, Ĉiovida Buĝeto?

Angore mi malfermas la pordon. Ĉio estas malluma.

Bum!

Mi piedfrapis seĝon ...

Mi estas tro nervoza. Ŝajnas al mi ke mi aŭdis kvazaŭ etan ridon en la banĉambro.

Mi ŝaltas la lampon de la vivĉambro.

Mi vidas nenion nenormalan.

La pordo de la dormoĉambro estas fermita. Mi ĝin malfermas. Mi ŝaltas la lampon.

4

Mi glaciĝas. Mi ne kapablas eĉ fingron movi. Sed mi klarege vidas. Miaj okuloj kaj mia cerbo palpas la vidaĵon.

Klara kaj Sonjo kuŝas sur la lito, unu apud la alia, nudaj kaj sangokovritaj de kap' ĝis piedoj. La lito, la planko estas ruĝaj ... sangruĝaj, sangaj!

Iliaj ventroj estas tranĉitaj de supre malsupren.

Sur la muroj ... oni amuziĝis alglui la intestojn de Klara kaj Sonjo, kaj stampadi manojn ŝmiritajn per ilia sango: ne ajne, sed bonorde, eĉ artisme.

Mi ankoraŭ rigardas ilin. La okuloj de Klara estas fermitaj. Sonjo havas unu okulon malfermita kaj la alia estas ruĝa truo: oni eltiris ĝin.

Mi frostiĝas ... mi frostiĝas ...

* * *

Subite, eksplodo de malbelsona, elektra muziko vipas mian tutan korpon.

Mi nun estas ĉirkaŭata de homamaso. Estas Sinjoro la Direktoro kaj la lernantoj. Ili estis sin kaŝantaj en la banĉambro, kaj eliris gaje kriante „Surprizon!” Ĉiuj estas sangomakulitaj.

Lia Doktora Moŝto ĵetas buleton aeren, kaj ĝin kaptas antaŭ ol ĝi falos. Tiu buleto altiras min. Estas okulo. La okulo kiun oni eltiris al Sonjo, evidente. Mi sekvas la buletiron: supren, eksenmove, malsupren, enmane. Mi rigardas lian vizaĝon. Ĝi havas sian ĉiaman bonvoleman mienon. Sed li tuŝis sian vangon per sia sangomakulita mano, kaj lasis sur la vango ruĝan ŝminkon, kiu iel similigas lin al klaŭno. Li plue ludas per la buleto. Li estas komika. Mi ekridus, se mi ne tiel malvarmiĝus ...

Iu komencas paroli. Ne, li recitas. Estas Bitelo Smit, SMIB480410, la longhara poeto de la Fina Klaso. Kvazaŭ li estus filmata, li zorge, mezure gestadas, kaj svingas siajn mallarĝajn koksojn, postaĵon kaj krurojn kiujn premas kloŝforma pantalono. Per sia unutona, seksarda njo-voĉo, li deklamas:

„Jen la supera Kunigo de Sekso kaj Morto: jen la kosma

orgasmo: l' enmergo en neniecon, ĉion al ĉio gefratiganta. Ĉu morti ne estas paroksismo de l' amo? Kia sekskuniĝo superos tiun eternan senmemorigon de l' unu en la alia, de l' unu en la ĉio, de ĉio en la ĉio... kiu estas morti?"

La dormoĉambro estas plene ŝtopita de la lernantaro. Ili tretas en la sango. Ili parolas, ili samtempe parolas, kaj ĉar ili ne povas kompreni inter si, laŭtigadas la voĉon kaj krias, krias ĉiuj samtempe, eĉ pli laŭte ol la muziko. Iuj ekbruligas tabako-, mariĥuano- kaj haŝiŝo-cigaredojn, kaj tiesodoro miksiĝas kun odoro de buĉaĵo. Aliaj dancas, ruligante la koksojn.

Sinjoro la Direktoro bonvoleme enspiras eksuĉon de mariĥuano-cigaredo, respekteme proponita de lernanto. Li adeludas per la okulo de Sonjo. Li sin turnas al mi duonvoĉe, kaj, malgraŭ la ĝenerala kriado, mi tre bone aŭdas lin.

„Belega buĉado, mia kara sinjoro, treege belega buĉado. Mi pensas ke ĝi estis la plej bona praktika leciono de la jaro. Fakte, ĉi-tie ni atingis la Senmajstran, Laŭvolan, Liberan Instruadon! Ni finfine plenumis la dezirojn de miloj da lernantoj, psikologoj, pedagogoj ...! konsciuj, konsciuj kian literaturan kaj artan inspirfonton, kian biologian laboratorio-praktikon, kian ... kian ... vere, mi ne havas vortojn ...!”

Mi rigardas liajn okulojn. Mi sentas malvarmon. Eble li tion ekscias, ĉar li iomete ekkoleriĝas, laŭ sia maniero: li iĝas pli patreca.

„Ej! Mia kara, ej! Mi komprenas, eble vi estas iom surprizita ...” - la aliaj plue tretas en la sango, krias, fumas, svingiĝas ... - „bone, eĉ tre surprizita. Sed pensu pri niaj lernantoj! Estu objektiva!”

Lia patreca voĉo sin alnajlas al mia cerbo.

„Pripensu: pripensu pri la momento kiam la plej diligenta el niaj lernantoj legos sian verkon. Imagu la salonegon de la Lernejo ŝtopitan per publiko; imagu liajn Uzinestrajn Moŝtojn, Sinjoron la Altan Horoskopiston, Sinjorojn la Profesorojn

surhavantajn siajn biretojn kaj talarojn ... Kaj ..., kaj tiam, nia lernanto, la plej diligenta (kial ne tiu Bitelo Smit, SMIB48041), salutas klinante sin antaŭ la publiko, kiu ŝtorme aplaŭdas, kaj komencas:

„La Bela Buĉado”. Ne. Simple, pli bone: „La Buĉado”. Jes, mi trovis la ĝustan titolon ...

La tabako-, mariĥuano- kaj haŝiŝo-fumo ŝtopas la ĉambron per infera nebulo, kiu mallumas kaj sufokas. Ili kriegas, svingiĝas, tretas en la sango, inter si ĵetas karnopecojn ...

Mi ĝismorte frostiĝas. Sed Lia Doktora Moŝto daŭrigas:

„Ho! Mi scias ke vi pensas pri *via* edzino, pri *via* filino ... Sed forgesu viajn personajn problemojn, eliru el *via* etspirita subjektivismo, kiu ne honoras vian dignan profesion ... Provu iom plialtigi vian penson; ekkonsciu kian grandan servon *via* edzino kaj *via* filineto faris al Edukado, mi plidiras, al Scienco, al Homaro, al Satanisma Rokmuziko ... eĉ al vi, mia kara Pisa Moŝto, ha! ha!” - li amike frapas mian ŝultron, atentigante ke li ŝercas - „ĉar vi ne plu iros piede. Mi promesas, jes, mi promesas al vi ... rikiŝon, kaj salajrpligrandigon por bredi nesindikatan konkubinon!

La okulo de Sonjo lude, gaje, ekridetante saltas el la mano de la Direktoro: supren, eksenmove, malsupren, enmane...

Tiu ĉi provekzemplero de „Kapturnoj” enhavas nur la 3 unuajn ĉapitrojn de la verko. La plena libro estas aĉetebla ĉe Flandra Esperanto-Ligo, retbutiko@fel.esperanto.be, www.retbutiko.be.

Kolofono

Titolo: Kapturnoj

Aŭtoro: Higinio García

Serio: „Stafeto” n-ro 24

Kovrilo: Hugo Fontyn

ISBN de la papera eldono: 90 71205 82 7

Leĝa depono de la papera eldono: D/1999/2924/3

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - 2060 Antwerpen

www.retbutiko.be

© 1999, 2010 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi provekzemplero de „Kapturnoj” enhavas nur la 3 unuajn ĉapitrojn de la verko. La plena libro estas aĉetebla ĉe Flandra Esperanto-Ligo, retbutiko@fel.esperanto.be, www.retbutiko.be.